

# HEJS-JUNEKO

Eldonas: HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SEKCIO (de H.E.F.)

Redaktoro: Carlos N. Moya Seguí  
Av./ del Cid, nº 106-Esc. 1-7ª  
VALENCIA-18 (Hispanio)

Nº 112  
Nov.-Dec.  
1980



H.E.J.S.-Kumveno okaze de la  
40ª Hispana Kongreso de Esperanto en Madrid

# ENKONDUKO

Antaŭ unu jaro kaj duono en la Hispana Kongreso de Esperanto en Gijón, la tiama HEJS-Estraro demisiis kaj malaperis la organizo.

En la monato de Decembro-1979<sup>a</sup> Madrida Esperanto Liceo organizis kunvenon por la reorganizo de HEJS, alvokante al ĉiuj la grupoj de Hispanio. El tiu-ĉi kunveno (al kiu ĉeestis gejunulojn el la grupoj de Bilbao, Santiago de Compostela, Valencia kaj Madrid, kaj solidariĝis Málaga kaj Elche) rezultis la eldono de "JUNECO", nomo alpensita de Santiago Sanz el Bilbao.

Mi proponis esti la kunordiganto de la revuon, kiu aperis de Januaro ĝis Julio de 1979<sup>a</sup>. Ĉiu grupo faris unu folion aŭ pli, fotokopiis ĝin kaj sendis al mi, kiu preparis ĉiu ekzemplero kaj sendis unu po grupo. Kelkajn monatojn kunlaboris kvar grupoj, en aliaj pli, en aliaj malpli. La celo de la revuo estis la komunikado inter la grupoj kaj ke ne perdiĝu la sento de unueco inter la esperantistaj gejunuloj en Hispanio.

En la Kunveno de HEJS en la Kongreso de Madrid (1980<sup>a</sup>) oni reorganizis la Sekcion kaj akordis uzi la revuon "Koncize" kiel nia revuo kaj daŭrigi eldonante "Juneco" laŭ nia deziro aŭ bezono.

Ankaŭ ni petis de la grupoj helpon (ekzemple pagante la duomon de la HEJS-kotizon al la junuloj kiu ne havas tro da monon, kiel mirinde faras Barcelona Esperanto-Centro), ĉar la estonto de Esperanto Movado estas la junuloj kaj devas esti apogataj.

Ankaŭ ni parolis pri fari reton da junuloj kiu reprezentos al HEJS en siaj respektivaj grupoj. Se iu estas interesita povas skribi al la Sekretario ĉe la sidejo de HEJS: Carreras Candi, 34-36 Barcelona-28.

Mi esperas ke ĉiuj per la laboro de ĉiuj ni povos konstrui fortan esperantistan junularan Movadon en Hispanio. Sincere via:

Carlos N. Moya Seguí (Valencia)

## HEJS - KUNVENO EN LA 40<sup>a</sup> HISPANA E-o KONGRESO

=====

Dum la 40<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Madrid, dum Julio, la gejunuloj kunvenis kaj reorganizis denove la Junularan Sekcion de H.E.F., kiu daŭrigas kun la nomo "Hispana Esperantista Junulara Sekcio".

Jen estas la konkludoj:

a) Ĉiuj HEJS-anoj (nepre malpli ol 25-jaraj) estas membroj de HEF, pagante la saman kotizon, tio estas: 500 pesetojn.

b) Ĉiuj HEJS membroj ricevos la bultenojn:

— "Boletín" de H.E.F.

— "Koncize", kiu estas eldonata de kelkaj junularaj sekcioj de Eŭropo.

— "Juneco", kiu estas eldonata de la Sekcio.

c) Por subteni la koston de la junulara agado, eldonon de "Juneco" kaj pago de "Koncize", ni petis al la HEF-Estraro, ke 45% de la kotizojn de la membroj de HEJS al HEF estu destinita al nia Sekcio; ni atingis la 35%.

ĉ) Subtenantoj kiu dezirus apogi al HEJS povas aboniĝi al la bultenoj "Koncize" kaj "Juneco" laŭ la kotizojn kiujn indikas la HEJS-Estraro.

d) La sidejo de HEJS estas ĉe Barcelona Esperanto-Centro: Carreras Candi, 34-36 BARCELONA+28.

e) La nova Estraro estas la jena:

Prezidanto: Jordi Ferré (Barcelona)

Vicprezidantino: Ana M<sup>a</sup> Ranero (Logroño)

Sekretario: Salvador Guillermo (Barcelona)

Vicsekretario: Francisco Muñoz (Murcia)

Kasisto: Carlos Aragay (Barcelona)

HEJS-Reprezentanto

en TEJO:.. ..Carlos Moya (Valencia)

Ni esperas grandan laboron kaj allogi multajn gejunulojn al la Esperanto Movado, tiu estas nia sincera deziro. LA ESTRARO

# ENKAĜIGITAJ DE LA SENSPERTO!

MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

Fine de la jaro 1976<sup>a</sup>, la Estraro, kies vicprezidanto tiam mi estis, sentis kiel nepran bezonon la necezon trovi kapablajn junulojn, koncerne Esperanton, por la transpreno de la SEKCIO (H.E.J.S.), (kiu fakte, kaj malgraŭ la nomo, funkcias preskaŭ kiel organizo). La kapableco al kiu ni sopiris, estis precipe lingva, kvankam ni konsciis ke, kompreneble, aliaj estas necesaj por la regado de la organizaĵo.

Tuj post la transpreno de la estraraneco far la novaj kuraĝuloj, mi konfesas ke mia timo ne plu estis kreata, almenaŭ altgrade, de la lingva kapableco, eĉ de la (laŭ kelkaj) ebla politikigo de la HEJS-revuo, sed la plej granda malamiko, kiun mi palpis, estis la sensperteco. Jam pri tio oni atentigis en la 100-a numero de nia revuo ("Kia estonteco por HEJS?"), kies relegadon mi varme konsilas al la nuna estraro, kaj kie mi diris interalie: "..., ili devas preskaŭ komenci denove la samajn erarojn, kiujn oni faris antaŭe, suferi la samajn mankojn kaj sekve de ĉio-ĉi la asocio, kiu pretendas agi eĉ naciskale, neniam estas forta kaj malfacile povas atingi iun certan gradon de solideco kaj de vera forta kaj fruktodona agado". Jen la danĝero!. Tamen, ĉu la nuna Estraro devis komenci suferante denove la samajn mankojn? TUTE NE! Ili, krom alio, havas ja realisman regularon (pli-malpli bona, tio estas alia afero), (kaj denove mi varme rekomendas al la nuna Estraro la tralegon de la artikolo "Pri nia regularo" far la sinjoro Juan Azcuénaga, aperinta en la revuo n<sup>o</sup> 95), ĉar tute bela demokratia regularo kun ĝeneralaj balotadoj de la HEJS-anaro, kaj ktp., estas en la nunaj kondiĉoj (manko de sufiĉa mono kaj reto de junuloj tra la lando, kies lingva nivelo kaj deziro labori estu almenaŭ meza, ktp) stulta frenezaĵo kiu kondukos nenien. La nuna HEJS-Estraro, laŭ mia vidpunkto, devas labori

por Esperanto sen brui pri sensignifaĵoj, kaj ne pasigi du-tri jarojn farante tion, kio jam, pli-malpli bone, estas farita, ĉar post tiu tempo ili ĉiuj estos "bruliĝitaj" kaj eble forlasos la postenon (mi ne diras tion pesimisme sed realisme), kaj denove venos alia Estraro (se oni trvas ĝin), al kiu eble ne plaĉos (la tempoj ŝanĝas, ankaŭ la gustoj) la refarita regularo, kaj ili komencos denove fari novan kaj ... ktp... ktp... por eterne, Amen!

Do, la malfacilaĵoj al kiuj la nuna Estraro aludas en sia artikolo "Enkaŝigitaj" estas infanaj (mi neniam volas vundi per ĉi aserto, kredu min!), ĉar se H.E.F. elektas la prezidanton de HEJS, tio okazas laŭ la rekomendo de ties Estraro, kaj aldone ĝi okazas NEPRE, ĉar, kiel vi ŝajnas ignori, tion postulas la statutoj de HEF, kiuj estas leĝe rekonitaj de la Hispana registaro; do: tre malfacila ŝanĝeblaj.

Ankaŭ la aserto de la HEJS-Estraro, ke ili povas fari nenion sen antaŭ peti permeson al HEF, estas grandparte malĝusta, kaj krome tiu burokrata baro estas facilege solvita de la antaŭa Estraro, kiu ankaŭ konsciis pri la perdo de tempo kiun estigas la interŝanĝo de leteroj kun la "malskribema federacio"; jen do la simpla artifiko kiun ni uzis: kiam ni bezonis aranĝi ĉion ajn, ekzemple okazigi estrar-kunsidon, ni sendis la tagordon al la federacio aldonante ke se antaŭ definitiva dato HEF malaprobas ĝin, letere aŭ telefone, ni komprenas ke estas nenia malfacilaĵo, kaj konsekvence, agos. Por akcenti la bonegajn rezultatojn atingitajn per ĉi metodo, mi povas diri ke HEF respondis al neniu el niaj leteroj, kaj, do, ni agis ĉiam libere kaj laŭplaĉe.

Pitoreskaj estas viaj asertoj pri la rilatoj inter TEJO kaj UEA, kiuj klare montras ke vi konas tiujn rilatojn, same kiel mi la ĉinan lingvon (pri kiu mi scias nenion). Jes, HEJS havas sian propran monon kaj povas fari per ĝi kion ĝi volas; kontraŭe, TEJO havas nenion, do, faras nenion krom bele perdi

sian tempon teoriante en siaj komitatkunsidoj. HEJS regule eldonas propran revuon, kies aperon dependas nur ekskluzive de la koncerna respondeculo de la Sekcio, dum TEJO (kiu ridinde sin nomas organizo), ne povas aperi sian organon "KONTAKTO", ĉar UEA (la administrante, kiu ne donas eĉ unu duro) ne volas doni monon, kiun ĝi bezonas por siaj propaj aferoj, kaj kaŭzas la malfruiĝon de "unu jaro" al al TEJO-revuo, kune kun la komprenebla perdo de anoj por la organizo.

Ĉu oni volas pli? Certe estas multe pli direnda, sed mia hodiaŭa skribemo ĉesis. Mia artikolo estas eble iom tre forta por la HEJS-Estraro, sed tio estas tute bonintence, kaj kun la deziro helpi laŭeble. Ĝis la!

Miguel Gutiérrez Adúriz

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Nota de la Redaktoro:

Tiu-ĉi artikolo estis skribita antaŭ preskaŭ tri jaroj kaj estis sendita al la tiama Estraro de HEJS por la publikigo en la HEJS-revuo, sed pro kialoj, kiuj oni ne scias ankoraŭ, ne aperis en ĝi.

La aŭtoro de la artikolo, krom vicprezidanto, estis la redaktoro de la HEJS-revuo antaŭ la transpaso al la nova estraro kaj laboris multe, sed tio ĉi nur scias kiuj estis aŭ estas redaktoro de iu revuo.

Tiu-ĉi vortoj estas por informi al ĉi lastaj gejunuloj kiu eniris en la movadon, precize en HEJS, kiu laŭ la artikolo povas kompreni ke la Estraro kiu diras la aŭtoro estas la aktuala.

# MIA KONGRESA KRAVATO

Luis Serrano Pérez

Kiam mia edzino finpretigis mian valizeton por ĉeesti la Madrid-an Kongreson, ŝi diris al mi: rigardu kaj konstatu ĉu mankas ion, por ke poste ne kulpigu min, laŭ malnova kaj malbona kutimo via. Al tiu peto de mia karulino mi respondis jene: ĉu interne troviĝas la kravato?. La respondo de mia edzino estis ironia rideto kun afabla jesa certigo al mia demando. Jam de longe, hejme, ni parolis pri la kravata afero. Ŝi diris al mi: se vi salutas la Kongreson nome de tiu Asocio, kiu respondeca ĉefo vi estas, nepre vi surmetu tiun vidindan kravaton. Mia edzino bone scias ke mi ne estas amanto de tiu eleganta vestaĵo. Malgraŭ ĉio, kaj pro specialaj cirkonstancoj, mi promesis al mia ĉarma edzineto la surmeton de la kravato; eĉ mi atente kontrolis ĉu ĝi, la kravato, estis bone lokita en la valizeto sen la plej malgranda faldaĵo. Jes, ĉio estis en bona ordo.

Nu, jen mi, la sekvantan tagon de ĉi-tiu geedza konverzacio, en Madrido, kun mia valizeto, kiu kiel vera trezoro enhavis mian kravaton. La ĉeestintoj al la Kongreso bone scias pri la varmeĝo kiu akceptis nin en Madrido. La vero estas ke tiu varmo iom forgesigis al mi la kravaton kaj eĉ pli, mi malbutonumis la ĉemizon.

Alvenis la momento de la kongresa salutado kaj mia kravato daŭre troviĝis en la valizeto. Mi ne sciis kion fari. Por konsulti dokumenton mi malfermis la valizon kaj tuj mi vidis ĝin; ŝajnis kvazaŭ mia kravato dirus al mi: kion vi atendas s-ro Serrano?, surmetu min kaj konstatu kiel tiuj, kiuj salutas nome de siaj organizaĵoj aŭ grupoj uzas kravaton. Sed mi pensis alimaniere ol mia kravato. Unue, la varmo estis granda; due, estis mia unuafoja publika salutado; trie, mia

buŝo estis sensaliva kaj se al tio aldonus mi la kravaton ĉirkaŭ la kolo, certe mi falus teren, sur la podio. Do, mi fermis la valizeton kaj atendis la vicon por la saluto; teruraj momentoĵ por mi.

Je la vespero, kiam mi revenis al tiu studenta restadejo, kie mi kaj aliaj gekongresanoj tranoktadis en internacia etoso sed ne esperanta, ĉar tiuj gestudentoj estis el Usono, mi malfermis la valizeton kaj antaŭ miaj okuloj troviĝis mia kompatinda kravato kaj io stranga okazis, ĉar mi sentis kvazaŭ ĝi estus parolanta jene: hontu s-ro Serrano, vi aperis malbela, vi ne permesis al mi aŭskulti la kuraĝigajn vortojn de la salutintoj. Terura konsciencia problemo por mi.

Dum la sekvantaj tagoj de la Kongreso mi evitis malfermi la valizeton. Mi ne kuraĝis meti min antaŭ mia kravato, sed alvenis la lasta tago en kiu mi ĉion devias pretigi por la foriro. Io konsterna okazis, mi malfermis la valizeton kaj kolereme mia kravato paroladis jene: Ho ve! Aĉa sinjoro Serrano, ne nur vi malpermesis al mi vidi la malfermon de la Kongreso, sed same vi faris rilate al la interesa prelego de G.C. Fighiera, al la scienca disertado de F. Azorín kaj al la altnivela parolado de D-ro M. Criado del Val; mi ankaŭ ne povis ĉeesti en la Seminario kaj fakaj aranĝoj de I.L.E.I., kaj tiuj de la fervojistoj, de via Asocio "Anton Balagué", de "Boletín", k.t.p.; vi ne permesis al mi ĉeesti en la renaskiĝo de H.E.J.S.. la starigo de la Komitato "Klara Silbernik". Mi ne povis vidi tiujn junajn kaj entuziasmajn gejunulojn de Madrido, kiuj tiel bone organizis la Kongreson, la diversajn aranĝojn en kiujn intervenis multaj gesamideanoj. Eĉ la diapozitivan prezentadon "La vojoj de Zamenhof" de A. Korniluk, mi ankaŭ ne vidis. Dum la fermo de la Kongreso, riproĉe kaj daŭre alparolis min mia kravato; mi restadis enfermita en la valizeto, same kiam la disdonado de la Literaturaj Premioj; mi ankaŭ ne iris al Aranjuez kaj Segovia; mi ne aŭskultis la paroladon de s-ano Casquero kaj la postan debaton; vi ne prezentis al mi viajn novajn geamikojn, novajn kaj malnovajn.



Jes, kara amiko, mi fermis honteme la valizeton ĉar tiom da riproĉojn mi ricevis de mia kravato, ke la momento ne plu estis eltenebla. Kiom detale ĝi montris al mi ĉiun eron de la Kongreso!!.

Eĉ mia kravato parolis al mi esperantlingve, pro la fakto ke ĝi estas de Esperanta deveno, ĉar iam ĉefa samideano portis ĝin al mi kiel donacon.

Kiam mi revenis hejmen kaj rakontis al mia edzino tiujn okazintaĵojn, vi jam povas imagi kio okazis. Al tiuj riproĉoj de mia kravato aldoniĝis tiuj de mia edzino. Terura reveno al la dolĉa hejmo, kara kolegoj.

Mi devas malkaŝi al vi, ke, por kontentigi la kravaton kaj mian edzinon mi promesis kunporti lin al venontjara Kongreso, kiu okazos en Murcio. Tiu promeso kvietigis ambaŭ, kaj mi esperas ke dume ili permesas al mi daŭre labori por nia kara idealo.

*Beni Serrano Pérez*



ĈU VI SCIAS RESPONDON?de F. Ricarte

Kial lerni aĉan, studi dum jaroj kaj jaroj?  
 fremdan, strangan lingvon?

Kial lingvon

Kial fortimpozi nepropan lingvon?  
 Kial al ni lingvaj imperialismoj?

.....estante lingvo tiel laŭdindfacila,  
 .....estante lingvo bele logiksimpla,  
 .....estante lingvo arte bonegesprimega,  
 .....estante lingvo vere internacia.

SUR HERBEJOde F. Ricarte

La sonaj kanzonetoj de la fonto sonas  
 La suno, nevarmege, brile, jam leviĝas  
 La junaj, dukoloraj ĉevalidoj kuras  
 La ĝojaj ridetadoj de l'virinoj sonas  
 La nuboj tra la globo de l'ĉiel' leviĝas  
 La brunaj sciuretoj inter branĉoj ludas  
 La olda ĝardenisto dum laboras kantas...  
 kaim mi kuŝas sur herbejo.

La longaj kaj taŭrinaj muĝoj tie sonas  
 L'odoroj tre ĝuigaj de l'herbar' leviĝas  
 La patron, birdidetoj en lignesto vokas  
 La bronza kaj maljuna sonorilo sonas  
 La birdoj, de la arboj ĝis ĉiel' leviĝas  
 La hundo post ŝafaro trairanta bojas

La ĉiuj formiketoj sian manĝon plukas...  
kiam mi kuŝas sur herbejo.

La paŭsa, tre trankvila, ĝoja spiro sonas  
La formo de l'montaro, de l'herbo vidiĝas  
La rozoj, tra l'kamparo, belodoron levas  
La bruoj de l'ĉarradoj ĉe l'voj', grince sonas  
La akvo en rivero eta sone fluas  
La vivon, ĉiuloke, vivi eble estas...  
kiam mi kuŝas sur herbejo.



## ESPERANTO - TURISMO

Mi opinias ke la plej taŭga maniero konstati la utilecon de Esperanto kaj ĝian facilecon, estas vojaĝi eksterlanden por partopreni Esperanto-aranĝojn aŭ kontakti kun esperantistoj kun kiuj ni nur povas paroli esperante.

Estas tre alloga vojaĝi, koni la vivmanieron de aliaj landojn, per faciligi tion T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) havas la Pasporta Servo. Pasporta Servo pretigas liston de gastigantoj ĉiun februaron; tiu de 1980 listigas 360 adresojn en 48 landoj kie vojaĝantoj povas senpage tranokti, aĉetante tiun liston (18 francaj frankoj, 9 guldenoj aŭ 9 internaciaj responkuponoj) ni rajtas uzi la servon.

Se vi deziras pli da informojn, vi povas peti al: J.-M. Cash, 9 rue de Languedoc, F-78690

Les Essarts-le-Roi, FRANCIO

La liston estas aĉetebla ĉi-tie aŭ ĉe la Centra Oficejo de U.E.A. (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO).

Ankaŭ la faka organizaĵo de U.E.A. "Monda Turismo" eldonas je la komenco de ĉiu jaro kalendaro kiu enhavas preskaŭ ĉiuj la Esperanto-aranĝoj de la jaro. Pri "Monda Turismo" informas sia vic-prezidanto: M. Finkenzeller, Stiegorg. 6/22, A-1150 Wien AUSTRIO.

Pretigu jam vian Esperanto-vojaĝon por via Periado.

=====

**KOTIZOJ**

=====

Ĉiu junulo malpli ol 25-aĝa pagante la kotizon al HEF estas aŭtomate membro ankaŭ de HEJS kaj ricevas la revuojn: "HEJS-JUNECO", "KONCIZE" kaj "BOLETIN".

HEJS-membroj.....500 pto  
 Revuoj: "HEJS-JUNECO" kaj "KONCIZE" (kune).....250 "  
 Revuo: "HEJS-JUNECO" (sola).....150 "

=====

**ESTRARO**

=====

Prezidanto

Jordi Ferré i Martínez  
 Carreras Candi, 25-B-1<sup>a</sup> 4<sup>a</sup>  
 BARCELONA-28

Vicprezidanto

Ana M<sup>a</sup> Rapero Antolín  
 Duques de Nájera, 20-8<sup>a</sup>A  
 LOGROÑO

Sekretario

Salvador Guillermo  
 Escultor Canet, 20-1<sup>a</sup>-2<sup>a</sup>  
 BARCELONA-28

Vicsekretario

Francisco M. Muñoz Garre  
 Carretera de Bemiel, 47  
 Alquerías (MURCIA)

Kasisto

Carlos Aragay Girona  
 Bassegoda, 40-3<sup>a</sup>-1<sup>a</sup>  
 BARCELONA-28

HEJS Re prezentanto en TEJO

Carlos N. Moya Seguí  
 Avenida del Cid, 106-Esc. 1-7<sup>a</sup>  
 VALENCIA-18

=====

**SIDEJO de H.E.J.S.**

=====

Carreras Candi, 34-36  
 BARCELONA-28



La Marxuquera  
 GANDIA (VALENCIA)

Jam funkcias la kampa-  
 dejo por esperantistoj  
 "Esperanto-Oazo" ĉe  
 La Marxuquera - GANDIA  
 (VALENCIA). Situas en mi-  
 rinda loko proksime al la  
 maro. Krom la normalaj  
 servoj, havas komunan ĉam-  
 bron kun kameno, naĝejoj,  
 ludkampo por flugpilko  
 kaj ludparko por infanoj.

Petu pli da informoj  
 al: Aquiles Sanz  
 Aptd. 171  
 Gandía (VALENCIA)